

Михаил  
Лермонтов,  
La anĝelo

*tradukita de Boris  
Mirski*

Kun kanto solena en  
nokta ĉiel'  
Sin portis mirinda  
anĝel';  
Kaj luno, kaj ste-  
loj, kaj nuboj en  
rond'  
Atentis la himnon de  
l' mond'.

Li kantis pri vivo sen  
zorga ĉagren'  
Sub branĉoj de pura  
Eden';  
Kaj laŭd' al keruboj,  
al granda Sinjor'  
Elflugis sincere el  
kor'.

En brakoj animon li  
portis al ter',  
Al mond' de  
malĝojo, mi-  
zer';  
Kaj restis la kanto en  
juna anim'  
Sen vorto, sen unu  
esprim'.

Kaj plena je stranga,  
mirinda dezir'  
Ĝi vagis en mond' de  
sopir',  
Kaj tedis al ĝi post la  
kant' de l' eter'  
La veaj motivoj de l'  
ter'.

...

Михаил  
Лермонтов,  
Anĝelo

*tradukita de Vasiliĵ  
Devjatnin*

En mezo de nokto,  
en blua ĉielo,  
Traflugis kaj kantis  
plej bela anĝelo.  
Kaj nuboj kaj steloj  
kaj lun' en irado  
Atentis kun ĝojo je l'  
sankta kantado.

Li kantis feliĉajn, ne-  
niam pekantajn  
Spiritojn, kun Di' en  
ĉielo loĝantajn;  
Li kantis pri Patro  
ĉiela kaj tera—  
Kaj lia laŭdado ne  
estis malvera.

Animon tre junan en  
brakoj li tenis;  
En mondo malgaja  
naskiĝi ĝi venis.  
Kaj sono de l' kanto  
en juna animo  
Restadis sen vort',  
sed kun viva esti-  
mo.

Tre longe en mondo  
ĝi estis premata,  
Je revo mirinda pri  
Di' plenigata!  
Kaj ŝanĝi la kanton  
de l' sankta since-  
ro  
Ne povis por ĝi ĉiuj  
kantoj de l' tero.

...

Михаил  
Лермонтов,  
Der Engel

*tradukita de N. N. 98*

Argiope-informo:  
La aspekto de tiu ĉi  
versio estas bari-  
ta.  
Supozeble la aŭtoro  
decidis tion.

...

Михаил Лермонтов,  
The Angel

*tradukita de N. N. 97*

At midnight an angel was  
crossing the sky,  
And quietly he sang;  
The moon and the stars  
and the concourse of  
clouds  
Paid heed to his heavenly  
song.

He sang of the bliss of the  
innocent souls  
In heavenly gardens above;  
Of almighty God he sang  
out, and his praise  
Was pure and sincere.

He bore in his arms a young  
soul  
To our valley of sorrow and  
tears;  
The young soul remembe-  
red the heavenly song  
So vivid and yet without  
words.

And long did it struggle on  
earth,  
With wondrous desire im-  
bued;  
But none of the tedious  
songs of our earth  
Could rival celestial song.

...

Traduko de la Rusa poeto "Ангел" de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 - †1841-07-27) en Esperanton de Boris Mirski.

Arg-1039-2113 (2014-06-03 11:55:42)

Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en <http://donh.best.vuh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/lermontov/angxelo.html>.

Traduko de la Rusa poeto "Ангел" de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 - †1841-07-27) en Esperanton de VASILIJ DEVJATNIN (\*1862 - †1938).

Arg-1039-2114 (2014-06-03 12:21:00)

Pri la tradukinto vidu la vikipediejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij\\_Devjatnin](http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Devjatnin).

Traduko de la Rusa poeto "Ангел" de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 - †1841-07-27) en la Germanan de N. N. 98.

Arg-1039-2112 (2014-06-03 17:30:50)

Tiu ĉi poem-germanigo troviĝas en la retejo <http://maschas-buch.blogspot.de/2011/09/lermontov-der-engel.html>. Vidu ankau: <http://home.arcor.de/berick/illeguan/lermont1.htm>.

Traduko de la Rusa poeto "Ангел" de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 - †1841-07-27) en la Anglan de N. N. 97.

Arg-1039-2111 (2014-06-03 11:29:07)

Tiu ĉi laŭvorta poem-angligo troviĝas en <http://max.mmlc.northwestern.edu/~mdenner/Demo/texts/angel.html>.